Manfred Hausmann,

Ammorto

tradukita de Manfred Retzlaff

Ho Plejaltulo, kiu vi la ondojn
ordonas sur la mar' de l' eterneco,
ekaŭdu mian plej sekretan peton!

Se iam dum la nokto mia brusto
korbatojn sentas kaj sopiron trinkas
de l' ĝeme sin donanta amatino,
nin ambaŭ levu, min kaj la ardantan,
sur bordon de fantoma ŝipo via.
Kaj lasu nin forŝvebi en malhelan
nenion, nin ambaŭ ĉirkaŭbrakumantajn,
mortemajn, senkonsciajn nin, malpezajn.

Traduko de la Germana poemo "Liebestod" de MANFRED HAUSMANN *(∗1898-09-10 – †1986-08-06) en Esperanton de* MANFRED RETZLAFF *(∗1938-11-04) en 2014-07-16.*

Arg-1083-2180 (2014-07-17 17:32:36)